1- Trotaksas pri nia vivdaŭro, aŭ pri nia kariera prosperado; kaj samtempe

2- Ni subtaksas pri la probableco de eksuferado de ekz-e serioza malsano, aŭ ekesti en aŭtomobila akcidento.



Ĉu ni priscias tion?

Resume, ni estas pli optimismaj ol realismaj, **tamen** ni ne estas konsciaj pri tiu ĉi fakto.



Optimismo kaj geedziĝo



Kiel ekzemplo, rigardu al geedziĝo. En Irano trionoj kaj en la okcidenta mondo ĉ. 40 procentoj de geedziĝoj finiĝas per divorco! Tio signifas altan probablecon de divorco por ĉiuj, tamen kiam vi demandas novgeedzojn pri sia propra probableco de divorco, ili taksas ĝin ĉe nul procentoj.

Optimismo kaj divorc-advokatoj

Eĉ divorc-advokatoj, kiuj pli ol ĉiuj jam vidis tiajn finojn, treege subtaksas pri probableco de sia propra divorco.





Optimismo kaj regeedziĝo

Do ni konstatas, ke optimistoj ne malpli ofte divorcas, sed ili pli probable regeedziĝos. Laŭ la vortoj de Samuel Johnson (1709 - 1784), brita verkisto kaj moralisto: **"Regeedziĝo estas la triumfo de espero super sperto."**

Henry Ford kaj nia povo

"Ĉu vi pensas ke vi povas, ĉu vi pensas ke vi ne povas, vi pravas."

Optimismo: (re)saniga (1)

Michael (Cael) Szkudlapski en sia retejo[1] eldonis rezultojn de siaj esploroj pri la bonefikoj de optimismo por (r)esti sana kaj korpe kaj psike. (1- http://salubriousu.com/optimism-and-stress/)



Optimismo: (re)saniga (2)



Liz Lockhart en la retejo de brita "Mensa Sano" [1] en sia artikolo titolita "**Optimismo povas esti utila por mensa sano**" citas eltrovon de esploristoj de Universitato Kolegio Londono (University College London) ke optimismemuloj emas nur elpreni informojn, kiuj plifortigas iliaj optimismajn vidpunktojn. (http://www.mentalhealthy.co.uk/news/996-optimism-can-be-helpful-to-mental-health.html)

Optimismo: (re)saniga (3)



La retejo EHE & Me[1] aperigis artikolon el EHE Novaĵ-letero (Volumo 13, Numero 22, Majo 29, 2013), kiu citas multajn esplorojn, kiuj montris:

La individuoj kun optimismemo vivas pli longe kaj pli sane.
https://www.eheandme.com/news_articles/549652445

Ĉieseco de optimismo



Optimismemo estas ĉies fenomeno. Tio ekzistas en:
* diversaj landoj, ĉu orientaj, ĉu okcidentaj;
* ĉu ĉe viroj, ĉu ĉe virinoj;
* ĉu ĉe infanoj, ĉu ĉe granduloj.

Nu, post konstato de epidemieco de optimismo, la ĉefa demando estas tio – fakte titolo de mia paroladeto – ke "Ĉu optimismemo utilas?"


Iuj diras ne; ili diras ke la sekreto de gajesto estas malaltaj atendoj, t.e. ne esti tre optimistaj pri futuro. Probable ilia logiko estas tiel: se ni ne atendu multon – ekz-e se ni ne atendu trovi amon aŭ (r)esti sana kaj



sukcesa, do ni ne seniluziiĝos kiam tiuj ĉi aferoj ne okazos; kaj plie, se ili okazos, ni estos pli ol gajaj ĉar surprize atingis neatenditajn bonaĵojn. Bonega logiko kaj teorio, sed ĝi eraras tri-kiale!

● 1-a kialo por utileco de optimism:

Kio ajn okazas, t.e. ĉu vi sukcesos, ĉu ne, se vi estas optimismema, vi sentos pli bone. Ĉar ĉiuokaze, via sento dependas al tio ke **kiel** vi interpretas la okazaĵon.



Psikologoj Margaret Marshall kaj John Brown esploris pri studentoj kun altaj kaj malaltaj atendoj. Ili trovis ke:

1- Altatenduloj se sukcesiĝas diras ke ili sukcesis ĉar ili estis diligentaj kaj meritantaj tion. Kaj se ili malsukcesis, ili diras ke ĉifoje la ekzameno ne estis deca, postan fojon ili certe sukcesos.

2- Malalt-atenduloj agas tute male: se ili sukcesigxas, ili diras ke ili sukcesis ĉar la ekzameno ĉifoje estis tre facila, sed posta ekzameno probable ne estos tia kaj ili malsukcesos. Kaj se ili malsukcesas, ili diras ke tio okazis ĉar ili fakte estas neinteligentaj.

● 2-a kialo por utileco de optimismo

Nura ago de atendado kaj antaŭ-vidado de io bona/plaĉa, gajigas nin multe. Konduta ekonomiisto George Lowenstein petis de siaj universitataj studentoj imagi ke ili povos havi kison de ilia plej ŝatata famul(in)o; kaj li petis ilin diri kiom ili pretus pagi por ĝui tion:

(1) nun,
(2) post tri horoj,
(3) post 24 horoj,
(4) post 3 tagoj,
(5) post 1 jaro,
(6) post 10 jaroj



Plejmulto da studentoj ne volis la kison nun, aŭ eĉ post 3 horoj, ili pretis pagi pli por atendi pli; sed ne pli ol 3 tagojn. Ja ili ne volis kison de maljunula famul(in)o post 10 jaroj!

Dum tiuj 3 tagoj ili ĝojo-plenus nur imagante ke kio, kie, kiel okazos... Plezuro de atendado de io plaĉega!




Tro Optimista?

Kiu semajn-tago plej ŝatatas?

Same, preskaŭ ĉiuj preferas ĵaŭdon al vendredo en nia lando (kie ĵaŭdoj duonferias kaj vendredoj tutferias) – kaj vendredon al dimanĉo en okcidentaj landoj. Ĉar en antaŭ-feria tago ili ĝojoplene atendas tuj venantan feritago(j)n, sed en la (lasta) feritago ili povas atendi nur la tuj venantan labor-tagon!

Daŭras



Povi ridi estas serioza afero

Kara homfrato,

Ĉu vi foje serioze pensas pri via sano? Ĉu vi jam pripensis kiom estas grava afero via sano future. Rido estas saniga. Rido malpezigas nin. Humuro malstreĉigas. Ridi povas liberigi nin de troa seriozeco, de premaj problemoj, de la ĉiutaga rutino. Rido estas mirakla kosmetikaĵo. Kiu havas haŭtfaldetojn pro ridado estas multe pli alloga ol iu kun glata haŭto.

Ridado kaj humuro influas nian digeston. Ili maltiksigas nian korpon kaj nian spriton. Rido ne nur bonfartigas nin sed ankaŭ nian ĉirkaŭaĵon. Sinceraj homaj kontaktoj baziĝas sur sento de egalvaloro. Preskaŭ ĉiuj tensioj inter homoj estiĝas pro sentoj de supereco aŭ malsuperco. Rido helpas nin relativigi nian propran prevecon. Ili malpliigas tensiojn en nia ĉirkaŭaĵo. Rido kaj humuro kreas spacon por antaŭe nekonata vivaĵo.

Tago sen ridi estas perdita tago. Serioze pensu pri tio!

خندیدن یک مطلب جدی است!

برادر عزیز آیا یک‌بار جدی در مورد سلامتت فکر می کنی؟ آیا تاکنون در این باره فکر کرده‌ای که سلامت تو در آینده چقدر جدی است؟ خندیدن سلامتی است. خندیدن ما را سبک می‌کند. طنز باعث انقباض می‌شود. خندیدن می‌تواند ما را از مسایل بی اندازه جدی، از مشکلاتی که به ما فشار وارد می کند و از تکرار مکررات روزمره رها سازد. خندیدن پوشش اعجاب‌انگیز چهره است. کسی که چین و چروک‌هایی بر روی پوست دارد با قهقهه بسیار جذاب‌تر و گیراتر از کسی که پوستی صاف دارد!

قهقهه و طنز گوارش ما را تحت تاثیر قرار می‌دهد و کالبد و روان ما را سم زدایی می‌کند. خنده نه تنها برای ما سلامتی است بلکه برای پیرامون ما نیز چنین است. ارتباطات انسانی صمیمانه مبتنی بر حسی برابر است. تاثیرپذیری بین انسان‌ها اکثرا باعث ایجاد حس برتری یا حقارت می‌شود. خنده به ما کمک می کند تا حقانیت خود را اعتبار بخشیم و تاثیرپذیری از اطراف‌مان را کاهش دهیم. خنده و طنز فضایی برای لذت از زندگی ناآشنای پیش رو می‌آفریند.

روز بی‌خنده روزی گمگشته است. در این باره جدی فکر کن!

نشریه: **Movado sen Nomo**

مترجم: ؟ ☹

Miaj Notoj

Nader Zandi

نادر زندی

یادداشت‌های من

Malnova amiko telefonis min. Por mi estis surprizego kaj, abundo da bonaj kaj malbonaj memoroj atakis min.

Li decidis resti en Istanbulo dum kelkaj semajnoj kaj proponis min interviziti tie. Mi ĉiam deziris vojaĝi al Turkujo kaj tiu estis bonega okazo, ĉar mi povis kaj viziti mian amikon kaj mallonge malproksimiĝi de la monotona vivo.

Oni povas iri al Istanbulo kaj per land-vojo kaj per aero-vojo. Ĉiu vojo havas siajn avantaĝojn kaj malavantaĝojn kaj certe dependas al persona inklino. Se - en mia lando - bonaj alternativoj ekzistus por land-vojaĝo, tiu estus unu el la plej bonegaj elektoj.

Oni povas ĝui la belajn pejzaĝojn, percepti la diferencojn kaj ankaŭ ĝui flaŭron kaj ŝanĝon de klimato. Modernaj busoj, trajnoj kaj ŝipoj havas ĉi tiujn avantaĝojn.

Sed vojaĝo per aviadilo!

Iri al flughaveno, fari kutimajn formalaĵojn, homamaso, mallogika senpacienco de kelkaj vojaĝontoj estas ĝenerale lacigaj kaj eĉ malĝojigaj.Oni enaviadiliĝas kaj post kelkaj horoj elaviadiliĝas sen kompreni de kie al kie iras.

Fine, mi decidis vojaĝi per aviadilo al Istanbulo. Aviadile veturi de Tehrano al Istanbulo daŭras kvin aŭ ses horojn.

Mi telefonis al kelkaj vojaĝ-agentejoj por akiri informojn pri hortabelo de flugoj. Malbonŝance ĉiuj flugoj de la irana flugkompanio *Iran Air* kaj la turka *Turkish Air* okazis frumatene. Iri dormeme kaj lace al flughaveno, mem estas alia rakonto.

Mi mendis bileton kaj post du tagoj mi iris al vojaĝ-agentejo de Turkish Air por akiri mian bileton, ĉar tiam elektronika bileto ne ekzistis. Flugo estis vendrede, frumatene.

Tre frumatene mi iris al flughaveno. Kiel ĉiame, kia homamaso kaj kompreneble kia diferenco kompare kun pasintaj jaroj.

Mi memoras kiam por unua fojo mi volis vojaĝi al Istanbulo. Ni (= popolo) devas alporti biletojn al la ĉefa oficejo de Iran-flugkompanio en Vila strato frumatene, de tie oni sendis biletojn kun pasportojn al ĉefministrejo por konfirmo. Post kelkaj semajnoj ni ricevis bileton kaj pasporton kaj ni iris al avidilejo kaj fine ni enaviadiliĝis. Kompare la diferenco

دوستی قدیمی به من زنگ زد. برای من بسیار غیرمنتظره بود و سیلی از خاطرات خوب وبد بـه مـن هجـوم آورد. اوتـصمیم داشت چند هفته‌ای در استانبول بماند و به مـن پیـشنهادکرد او را آن‌جا ملاقات کنم. من همیشه مشتاق سفر به ترکیه بـودم و ایـن موقعیت بسیار خوبی بود، زیرا هم دوستم را می دیدم و هم مدتی از زندگی روزمره یکنواخت فاصله می‌گرفتم.

هم از راه زمینی و هم از راه هوایی می‌توان به استانبول رفـت. هرکدام معایب و محاسن خود را دارند و البته آن بستگی به سـلیقه شخصی دارد. اگر امکانات خوب برای مسافرت زمینی [درکـشورم] وجود داشته باشد، مسافرت زمینی یکی از بهترین انتخاب‌ها اسـت. می‌توان از مناظر زیبا لذت برد تفاوت‌ها را درک و مشاهده کـرد، و هم‌چنین از پوشش گیاهی و تغییر آب و هوا لذت برد. اتوبوس‌هـای مدرن، قطار وکشتی این امتیازها را دارا هستند.

ولی سفر با هواپیما! رفتن بـه فرودگـاه، تـشریفات گمرکـی، ازدحام جمعیت و کم طاقتی غیرمعقول برخی از مـسافران، درکـل بسیار خسته‌کننده و حتی ناراحت‌کننده است. سوار هواپیما شـدن و پس از چند ساعت در فرودگاه دیگری پیـاده شـدن، بـدون آن‌کـه بفهمیم ازکجا به کجا می‌رویم.

من بالاخره تصمیم گرفتم با هواپیما به استانبول بروم. از تهران تا استانبول چهار یا پنج ساعت پرواز است.

به چند آژانس زنگ زدم تـا اطلاعـاتی در مـورد پروازهـا بـه استانبول بگیرم. از شانس بد من تمام پروازها صبح بسیار زود بـود. هم ایران ایر و هم هواپیمایی ترکیه. خواب‌آلوده و خسته به فرودگاه رفتن و تشریفات گمرکی را انجام دادن، خود داستان دیگری است.

بلیط را رزرو کردم و دو روز بعد برای گرفتن بلیطم به آژانس مسافرتی ترکیه رفتم زیرا آن زمان هنوز بلیـط الکترونیکـی وجـود نداشت. پرواز روز آدینه (جمعه) صبح زود بود.

صبح بسیار زود به فرودگاه رفتم. مانند همیـشه چـه جمعیتـی والبته چه تفاوتی با سال های گذشته.

به‌یاد دارم سال‌ها پیش برای اولین بـار کـه مـی‌خواسـتم بـه استانبول بروم، باید نخست بلیط‌ها را صبح زود به دفتر اصلی ایران ایر در خیابان ویلا می‌بردیم و از آن‌جا آن را به‌همراه پاسـپورت بـه نخست‌وزیری برای تایید می‌فرستادند. پس از چند هفتـه بلیـط و پاسپورت را دریافت می‌کردیم و به فرودگاه می‌رفتیم و بالاخره سوار هواپیما می‌شدیم. در مقایسه با حال تفاوت زیاد است و مهـم‌تـر از همه بسیار راحت‌تر.

پس از چند ساعت مسافران استانبول را بـه پیـشخوان کنـترل بلیط فراخواندند. بلیط‌ها در آن‌جا چک می‌شـود و مـسافران کـارت

estas grandega kaj nun pli grave estas pli komfortega.

Post kelkaj horoj oni vokis vojaĝontojn al biletkontrolejo. Tie oni kontrolas biletojn kaj vojaĝontoj ricevas flugo-karton. Poste, parto de policokontrolo pri pasporto.

Mi tre lace alvenis al aviadilejo de Istanbulo ĉar tiam malgraŭ ĉiuj admiroj pri aviadiloj de Turka flugkompanio, ekflugi kaj alteriĝi malbone okazis.

En aviadilejo mi iris al pasport-kontrolo kaj policoficiro ridete bonvenigis. Poste, por akiri mian valizon, mi iris al parto de liverado. Post kelkaj minutoj mi prenis mian valizon kiu estis sur movanta linio kaj por taksio mi iris al ties parto.

Mi ne estis maltrankvila trovi hotelon ĉar mia amiko mendis ĉambron en hotelo kaj estis paginta la antaŭpagon. Tiam unu dolaro de Usono egalis 1500 rialoj. (kompreneble, tiam, mi neniel revis ke valuto de dolaro altiĝos pli ol 30000 rialojn. Survoje ŝoforo de taksio plendis pri multekosto, speciale pri fakturoj de akvo kaj elektro. Laŭ irana proverbo la ĉielo havas la saman koloron ĉie.

En hotelo mia amiko atendis min kaj preparis bonan programon por unu semajno. El Irano mi kunportis por li tradiciajn kukojn kaj artefaritaĵojn. Li ankaŭ donacis min librojn kiujn mi ankoraŭ havas en mia librobretoj. Kune, ni vizitis historiajn monumentojn kaj certe por mi arkitekturo de Bizancio (orienta Romo) estas impresiga, speciale ties ceramikado neniam ripetiĝis dum la historio.

Unu semajno rapide pasis kaj mi reiris al Irano. Mi ne plu vizitis mian amikon sed ni korespondas kaj kiam ni telefonas unu la alian, ni parolas pri memoraĵo de tiu vojaĝo.

Nenio kiel vojaĝo povas lernigi homon kaj ŝanĝi lin. Laŭ la psikologio vojaĝo ŝanĝas spriton de homo kaj eĉ kaŭzas ŝanĝon, progresigon de pensado kaj opinion. Ĉiam gravuloj ankaŭ estis vojaĝemuloj.

Ŝanĝo de medio ŝanĝigas stereotipan vidpunkton kaj la restriktoj de pensado subite forlasas homon, kvazaŭ homo estas metata en nova nivelo de energio kaj pli optimismas kaj ĝojas. Ne gravas, ĉu "Ĉirkaŭ la mondo en okdek tagoj" de Jules Verne, ĉu mallonga vojaĝo. Eĉ, progresado de scienco kaj teknologio kaj rigardadi tutajn dokumentfilmoj de mondo per televidilo ne povas anstataŭi vojaĝon.

پرواز را دریافت می‌کنند. سپس قسمت پلیس برای کنترل پاسپورت.
بسیار خسته به فرودگاه استانبول رسیدم زیرا آن‌زمان با تمام تعریف‌ها درباره هواپیماهای شرکت هواپیمایی ترکیه صعود و فرود هواپیماهای ترکیه بسیار بد انجام می‌شد.

در فرودگاه به قسمت کنترل پاسپورت رفتم و افسرپلیس با لبخند خوش آمد گفت. سپس برای گرفتن چمدان‌ها به قسمت تحویل بار رفتم. پس از چندین دقیقه چمدانم را از روی ریل متحرک برداشتم و برای گرفتن تاکسی به قسمت مربوطه مراجعه کردم.

برای پیدا کردن هتل نگران نبودم زیرا دوستم رزرو اتاق را در هتلی برای من انجام داده بود وپیش پرداخت را پرداخت کرده بود. آنزمان یک دلارآمریکا معادل شش هزاروهشتصد ریال ایران بود . (البته آن موقع به خواب هم نمی‌دیدم که نرخ مبادله دلار از مرز سی هزار ریال بگذرد.). درمسیر فرودگاه تا هتل راننده تاکسی از گرانی و به‌خصوص گرانی قبض‌های برق، آب شکایت می‌کرد. بر اساس ضرب‌المثل ایرانی همه جا آسمان یک رنگ است.

در هتل دوستم منتظرم بود و برنامه خوبی را برای یک هفته تنظیم کرده بود. از ایران برای او شیرینی‌های سنتی و صنایع دستی برده بودم. او هم کتاب‌هایی را به من هدیه داد که هنوز آن‌ها را در قفسه کتابهایم دارم. باهم به دیدن آثار تاریخی رفتیم و البته برای من معماری بیزانس و روم شرقی بسیار تاثیرگذار است به‌خصوص کاشی‌کاری‌های آن که دیگر در تاریخ تکرار نشد.

یک هفته به‌سرعت گذشت و به ایران بازگشتم. دیگر دوستم را ندیدم اما هنوز با هم مکاتبه داریم و هر زمانی که به‌هم تلفن می‌کنیم از خاطرات آن سفر صحبت می‌کنیم.

هیچ چیزی مانند مسافرت کردن نمی تواند به انسان بیاموزد و او را تغییر دهد. از نظر روانشناسی هم، مسافرت روحیه آدم را تغییر می‌دهد وحتی باعث دگرگونی و جهش‌های فکر و اندیشه می‌شود. انسان‌های بزرگ همیشه مسافران بزرگی هم بوده‌ند.

تغییر محیط نگرش کلیشه‌ای را تغییر می‌دهد و قید و بندهای فکری ناگهان انسان را رها می‌کنند، گویی انسان در سطح جدیدی از انرژی قرار می‌گیرد و خوش بین‌تر و شادتر می‌گردد. حال چه داستان دور دنیا در هشتاد روز باشد و چه مسافرتی کوتاه. حتی پیشرفت علم وتکنولوژی و تماشای تمام مستندهای دنیا در تلویزیون نمی‌تواند جای مسافرت را بگیرد.

Jen Novaĵoj



Interesa sciigo por E-istoj kaj Ne-E-istoj !!!

1

Esperanto sur la pola Listo de la Nemateria Kulturheredaĵo

Ekde la 20-a de novembro 2014 Esperanto estas sur la pola Listo de la Nemateria Kulturheredaĵo; tio estas la ĉefinformo de la 389-a E-elsendo ĉe **http://www.pola-retradio.org**
La elsendo estas 25-minuta, sed tiu informon vi aùdos dum la 2-unuaj minutoj.
Rekomendindas aŭskultadon de ĉi tiu informo kadre de la elsendo de 21.11.2014
Bv diskonigi ĉi-tiun informon inter Viajn konatulojn. Antaŭdankon!

2


Villa Empain (Bruselo) akceptas artistojn 'en résidence' kiuj volas tie labori por kontribui al la kompreno inter oriento kaj okcidento.



Ili esperas iri al Irano venontjare. La fonduso esperas fariĝi kultura ambasadejo por la oriento.

https://www.youtube.com/watch?v=TJZWs_nI3Ds

LA KONKURSOJ DE SAMIDEANO



3

KUN LA PATRONECO
***de la* Komunumo Sankta Anĝelo de Brolo (Messina - Sicilia – Italia)**
***kaj de la* Itala Esperanto-Federacio**
estas anoncita la dua eldono

de la SENPAGA KONKURSO
"POEZIO EL ĈIUJ ĈIELOJ"
LIMDATO: LA 21-a DE MARTO 2015

KIU RAJTAS PARTOPRENI

Ĉiuj poetoj, el nia planedo.

LINGVOJ

La versaĵoj povos alveni en itala lingvo, en Esperanto, aŭ en ambaŭ lingvoj. Tiu ĉi konkurso naskiĝis en Italio, danke al iniciato de itala esperantisto.

Italio, krom la antikva Romo kai la mallonga frenezo dum la komenco de la dudeka jarcento, ne havas imperieman tradicion, ne trudas propran lingvon al la mondo per armiloj aŭ ekonomia potenco, ne martelas la mensojn de usonanoj, eŭropanoj, afrikanoj kaj de hindoj per kantaĵoj kaj sloganoj. La mirinda itala lingvo, kiu ne estas laŭmoda en la parolado de la politikistoj kaj arogantaj pseŭdo-intelektuloj, iris tra la mondo nur kun la elmigrintoj kaj artistoj. La italaj civitanoj, kiel multaj aliaj, kapablas kompreni tre bone kio estas la perforta kultura invado, ĉar ili jam suferas pro tio; li bone kapablas kompreni la rolon de neŭtrala lingvo por perado, kiu respektas ĉiun kulturaĵon, kaj estas konceptita por la frateco kaj harmonio inter popoloj. Kiu diras, ke ĝi ne estas bezonata, ĉar oni havas la anglan aŭ la ĉinan lingvojn, tiu estas kulture jam tiom regata kaj envultata por ne percepti, ke oni estas minacanta lian identecon kaj apartenon. La lingvo-milito, kiu estas parto el pli vasta konflikto por superregado, kaj pasee kaj nun, estis historio de violento kaj perfortado. Tio neniam povos porti la pacigon kaj la plenan, reciprokan respekton inter popoloj.
Do, tiu ĉi konkurso originas el amo por la poezio kaj el amo por la libereco de ĉiuj gentoj, kiun Esperanto simbolas. Ĝi direktiĝas al italaj poetoj kaj, per Esperanto, al ĉiugentaj poetoj. *Poesia da tutti i cieli. Poezio el ĉiuj ĉieloj.*

KIAMANIERE ONI PETAS PARTOPRENI
La poetoj devas partopreni per nur unu poeziaĵo ne pli longa ol 50 (kvindek) versoj entute. Oni sendu ĝin, kune kun la aliĝilo aperanta ĉi-sube, per retpoŝto al: samideano@hotmail.it

AJNA POEMTEMO ESTOS AKCEPTITA
Ĉiuj tekstoj en formato word!
La verkoj devos alveni antaŭ la 21-a de marto 2015.

SEN PARTOPREN-KOTIZO

Konsiderante la elspezojn, kiujn kuntrenas la internacia sendo de mono, kaj la malsaman voloron de mono en aliaj landoj, oni decidis, ke la poemoj en Esperanto, kiuj alvenas el ekster Italio, ne pagas partopren-kotizon.

REALIGO DE LA LIBRO

La juĝantaro elektos la plej belajn versaĵojn (50), kaj ili konsistigos interesan poezian kolekton el ĉiuj latitudoj, laŭ koroj kaj mensoj de nia planedo.
La poemoj, kiuj alvenos en la itala lingvo, estos tradukitaj al Esperanto de konata esperantisto kaj itala poeto.
La poemoj, kiuj alvenos en Esperanto estos tradukitaj, al la itala lingvo, de alia esperantisto, itala poeto.
En la eldonita libro, do, la sama poemo estos legebla en du lingvoj: sur la dekstra paĝo en la itala lingvo, sur la maldekstra en Esperanto.

PREMIOJ

La premiada ceremonio okazos en komunuma Teatro el Sankta Anĝelo de Brolo (Sicilio, Italio), la 18-an de oktobro 2015, en la 6-a horo posttagmeze.

Estos ses kategorioj de premioj:
Unua premio: Plato, unu ekzemplero de la libro eldonita, pakaĵeto de libroj donacitaj de Edizioni Eva, kaj € 300,00.
Dua premio: Plato, unu ekzemplero de la libro eldonita, pakaĵeto de libroj donacitaj de Edizioni Eva, kaj € 150,00.
Tria premio: Plato, unu ekzemplero de la libro eldonita, pakaĵeto de libroj donacitaj de Edizioni Eva, kaj € 100,00.
Speciala premio: La Itala Esperanto-Federacio premios la plej belan el la poemoj alvenintaj en Esperanto. Plato. Unu ekzemplero de la libro eldonita, pakaĵeto de libroj donacitaj de Edizioni Eva.
Speciala premio: Samideano premios la plej originalan el la poemoj alvenintaj. Plato. Unu ekzemplero de la libro eldonita, pakaĵeto de libroj donacitaj el Edizioni Eva.

Speciala premio: Edizioni Eva premios la plej belan el la poemoj ne selektitaj. Plato. Unu ekzemplero de la libro eldonita, pakaĵeto de libroj donacitaj de Edizioni Eva.

<u>La selektado de artverkoj estos neapelaciebla.</u>
N. B. La monaj premioj celas doni kontribuon al la premiitoj por iliaj elspezoj ĉeesti ceremonion. En la kazo ke la premiito ne ĉeestos, li ricevos hejme nur la platon kaj la librojn.

LA JUĜANTARO

La membrojn de la Juĝantaro, kiu konsistas el poetoj, verkistoj, ĵurnalistoj kaj literatur-kritikistoj, oni konigos post ĉi-koncerna oficiala decido.

La juĝantoj ricevos la verkojn, kiuj estos distingitaj per numero, dum la aŭtoraj nomoj estos konataj nur al Samideano, kiu sin detenas je voĉo, sed li gardas al si la rajton premii poemon, kiu, laŭ sia opinio, estas plej originala.

ALIĜILO

Kara aŭtoro, per ĉi tiu formularo vi akceptas la jenan regularon kaj la partoprenmanierojn, vi deklaras, ke via verko estas via kreaĵo kaj ke vi posedas ĉiujn ĝiajn rajtojn, krome vi akceptas la traktadon de viaj personaj elementoj, laŭ la reguloj antaŭfiksitaj de la leĝa dekreto 169/03 de la itala Respubliko kaj ekde nun vi permesas la eventualan publikigon de via verko.

Benvolu plenigi la sekvan formularon, en ĉiuj ĝiaj partoj.

> ***Familia Nomo***: ____________________

> ***Persona nomo***: ____________________

> ***Naskiĝdato***: ____________________

> ***Adreso (nacilingve en latinaj literoj)***: ____________________

> ***Poŝtkodo***: ____________________

> ***Urbo***: ____________________

> ***Lando***: ____________________

> ***Tel. (kun landa prefikso)***: ____________________

> ***Portebla***: ____________________

> ***Retadreso***: ____________________

> ***Titolo de via verko***: ____________________

Varsovia vento elsendo

4





2014.09.27 Pollando. Grandega torto okaze da la jubilea 30a Arkones.
Ĉe Facebook ni kreis la podkastan retejon kaj diskutgrupon, kie aperas informoj, fotoj kaj filmetoj, pere de kiuj ne nur aŭskulti la muzikon vi povas, sed ankaŭ vidi.

http://www.podkasto.net/2014/11/06/la-103a-elsendo/

Memhelpaj Agetoj

por pli bona vivado

Parto: 2

Omid Rohanian

C) Rilate al la menso

Krom emocia kaj korpa aspekto de homo, ankaŭ troviĝas mensa regno. Oni ankaŭ devas prizorgi ĝin. Jen kelkaj ideoj

- *Disvolvi idean muskolon*

Kompare kun fizikaj korpaj muskuloj, oni ankaŭ povas paroli pri mensa muskolo. Se vi volas esti ĉiam preta alfronti problemojn en la vivo kaj trovi solvojn al malfacilaj problemoj, vi devas havi kaj disvolvi viajn ideajn muskolojn.

Oni kiu ne kutimas pensi kreive ne povas agi inteligente.

Kiel oni disvolvu la ideajn muskolojn? Troviĝas multe da metodoj kaj ideoj fari tion.

- Ĉiutage dum la frua mateno, legu iun interesan. Iu ĉapitron el iu literatura/ scienca/lerniga libro, aŭ iu interesa blogo kiu donos al vi ideojn.
- Dum kelkaj minutoj, ludu iun mensan ludon kiel ŝakon aŭ provu solvi puzlon.
- Pensu pri interesaj ideoj kaj skribu ilin. Ne necesas pensi pri iu specifa temo. Pensu pri iu ajn vi volas, kaj provu skribi ideojn. Ekzemple ideojn por pli facilaj transakcioj, pli bonaj surstrataj trafikoj aŭ ideoj por maksimumigi profitojn en iu banko. La celo estas disvolvi la idean muskolon.
- Provu lerni iun grafikan arton por aktivigi la dekstran parton de la cerbo. Tiel, via idea muskolo ege plifortiĝos.
- Ĉiutage parkerigu 10 novajn esperantajn aŭ alilingvajn vortojn. Tiel, vi plibonigas vian esperanton aŭ lernas pri vortaro de iu nova lingvo, kaj tiel vi praktikas per viaj mensaj muskoloj.

D) Rilate al spirito

Spirito estas tiu parto de nia ekzisto kiu temas pri nia konscio kaj respegulas nian ĝeneralan humoron. Tiu parto kiu serĉas spiritecon kaj plialtan vidpovon.

- *Estu dankema*



Ni kelkfoje simple forgesas tiom da belecoj kaj benoj kion ni ĝuas kaj nur koncentriĝas sur niajn problemojn kaj multe plendas. Tio estas malsana konduto. Ĉiutage, ni devas almenaŭ dum kelkaj sekundoj, halti kaj pensi pri ĉiuj belaĵoj kaj bonaĵoj en nia vivo, kaj aprezu ilin. Ni estu dankema al la naturo aŭ la Dio (depende de nia filozofio) por ĉio ĉi. Ĉi tio purigas nian spiritan aspekton.

- *Estu pardonema*



Oni diras, ke troviĝas tiom da ĝuo en pardono, kiom ne troviĝas en venĝo. Tio pravas. Neniam donu spacon en viaj pensoj, al venĝo. Vivu vian vivon plene kaj ĝue, sen negativaj sentimentoj. Tiel, via animo puriĝos. Tio ne signifas, ke vi toleru negativajn kondutojn. Tio nur signifas, ke via animo meritas esti paca kaj pura.


- *Meditadu aŭ preĝu*



Unu maniero montri nian dankemon al la mondo estas preĝi aŭ meditadi. Meditado estas simpla. Mi scias, ke meditado por pli ol kelkaj minutoj povas esti enuiga. Sed meditado dum mallongaj tempoj dum la tago estas mirakle efika. Ekzemple vi estas en la lifto aŭ en taksio kaj por preskaŭ 60 sekundoj, vi fermas la okulojn kaj profunde enspiras kun malrapida ritmo, sen pensi pri iu ajn, nur vivante la momenton.

Noto: Dankon al *James Altucher*, kies ideoj multe helpis min skribi la artikolon.

Du pinarboj



Iam kreskis du pinarbetoj ĉirkaŭ vilaĝo. Ili ambaŭ staris apud unu la alia tute preter telefontendoj.

La vilaĝanoj, kiuj pasis preter jenaj du pinarboj diris unu la alian: "Jenaj du pinarboj certe estas kiel du fidelaj amikoj ."

Pasis tagoj, noktoj, semajnoj, monatoj kaj jaroj. Tiuj du pinarboj pli kreskis kaj pli grandiĝis. Nun ili fariĝis du fortaj pinarbegoj.

Iun tagon aŭtune vento blovis, blovadis kaj blovegis.

Unu el pinarboj ne povis toleri fortan blovegon kaj rompiĝinte falis sur alian arbon.

La rompita arbo diris alian sanan arbon: "Ho kara amiko, prizorgu min kelkajn tagojn. Miaj radikoj eltiriĝas. Se vi zorgus min, miaj radikoj denove kreskus kaj mi denove stariĝus. Do mi petas, helpu min por ke mi resaniĝu denove. Sed nekompata arbo diris rompitan arbon senafable: "Ne. Ne, mi ne povas teni vin. Mi ne havas tiom da forto teni vian pezon.

La malafabla pinarbo poste forĵetis malfeliĉan arbon kaj ĝi falis sur telefontendojn.

Aliflanke en telefonoficejo oni informiĝis ke ĉesiĝis kontako kaj telefoni ne eblas. Tial esplorteamo veturis por esplori aferon. La esplorteamo atingis al du pinarboj kaj sciis ke pro falo de unu el pinarboj sur tendoj okazis jena problemo.

La priparistoj denove priparis disŝiritajn tendojn kaj solvis la problemon. La esplorteamanoj diris al la alia: "Eventuale denove okazos similan eventon kaj falos alia sana pinarbo sur tendoj."

Do ili decidis evitigi jenan okazon kaj per siaj hakiloj rompis ambaŭ pinarbojn la rompitan kaj ankoraŭ-sanan!

Originale perslingva poemo de Mohammad Ĝavad Mohabbat.

Enesperantigis el persa linvo: Ali A. Kousari

De:



Kaj …

Antaŭaj numeroj disponeblas

Nomo:
Familia Nomo:
De numero: Ĝis numero:
Adreso:

Poŝt-kodo: Telefono:

E-poŝto:

Sendu la peton al la adreso:
E-poŝto: info@espero.ir

Bonan legadon,
Irana Esperantisto

Ĝis:



Troveblas Ĉe: www.espero.ir